der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde der DDR im Deutschen Kulturbund

5. Jahrgang Nr. 34/35 September/Oktober 1969 Doppelheft 50 Pf

NI UNUIĜU EN LA BATALO POR LA PACO!

La batalo por la paco rilatas la plej gravan — la estontecon de la homaro. Dum la unua duono de nia jarcento du mondmilitoj forfalĉis pli ol 70 milionojn da homoj. La malfeliĉa atomfungo super Hiroŝimo estis tragika averto pri la sekvoj, kiujn povus havi tria mondmilito, se la imperiismo sukcesus okazigi ĝin.

Sub la aktualaj kondiĉoj, kiam atombomboj atingas en malmultaj minutoj ĉiun kontinenton kaj povas dezertigi grandegajn areojn, monda konflikto signifus la pereon de centmilionoj da homoj kaj la cindrigon de la trezoroj de l'monda civilizacio. Daŭra paco hodiaŭ ne plu estas utopio sed reale atingebla celo. Nuntempe ekzistas en la mondo potencaj sociaj kaj politikaj fortoj, kiuj ribelas kontraŭ la milito pledante por malstreĉigo kaj vaste organizita internacia kunlaboro.

La konsekvenca pacpolitiko de la unua socialisma lando, la Soveta Unio, kaj de aliaj socialismaj ŝtatoj, la plifortiĝanta batalo de la laboruloj en la kapitalismaj landoj, la kresko de la nacia liberiga movado, la agadoj de vastaj rondoj de la demokrata monda publiko kaj de la pacbatalantoj povas forigi la fatalon de nova mondmilito kaj kreas realajn eblecojn por la realigo de pacaspiroj de l'popoloj.

(El la „Pacapelo" de l'internacia interkonsultiĝo de la komunistaj kaj laboristaj partioj en Moskvo 1969)

Nikola Aleksiev, Sofia

La Monda Asembleo por la Paco markis novan etapon en la porpaca batalo

En Berlino, la ĉefurbo de la pacama Germana Demokratia Respubliko, okazis la 21-an ĝis 24-an de junio zorgeme preparita Tutmonda Pac-asembleo.

Eble iu, kiu konas la evoluon de la tutmonda pacmovado, povas ekpensi, ke similaj manifestiĝoj estas organizataj ne unuafoje. Sed tamen la atentema observanto tuj konstatas, ke laŭ sia preparado kaj karaktero la Berlina Pac-asembleo estis unika en sia speco.

Antaŭ ĉio, la organizado estis farita de speciala Preparkomitato, kiu konsistis el reprezentantoj de multaj internaciaj kaj naciaj pacmovadoj kaj pacorganizaĵoj, inter kiuj ekzistas sufiĉe seriozaj diferencoj en la formoj kaj metodoj de la porpaca batalo. Ja ĉiu scias, ke ne ekzistas en la mondo unusola porpaca movado. La bildo de la pacmovadoj estas tre pitoreska kaj riĉa ĵe propraj al ĉiuj el ili stilo kaj metodo de agado. Ne malofte iliaj konceptoj pri gravaj problemoj aŭ eventoj lige kun la pacbatalo estas eĉ kontraŭaj.

Kaj tre gravan signifon havus, se iu povus preni la iniciaton kunvoki al unu loko la grandegan plimulton el tiuj diversaj pacmovadoj por amika interŝanĝo de konceptoj, opinioj kaj spertoj. Eĉ se oni ne atingus nepre unuecan starpunkton pri ĉiuj tuŝitaj problemoj, la utilo de simila renkontiĝo estas evidenta. Ĉar nenio povas helpi pli valore la kreadon de komuna starpunkto almenaŭ pri kelkaj problemoj ol anticipa libera pridiskuto, kiu riĉigas ĉiun partoprenanton, kaj poste en la komuna batalo por realigo de la akceptita agadprogramo oni pli rapide povus veni al unueco ankaŭ pri demandoj ĝis tiam nesolvitaj.

Se oni juĝas realiste, Tutmonda Pac-asembleo estas bezonata nome pro la ekzistanta en la pacmovado diverseco de tendencoj kaj konceptoj. Oni devas danki al la Tutmonda Pac-Konsilantaro en Helsinki, kiu prenis la iniciaton pri tutmonda renkontiĝo de ĉiuj pacamaj fortoj. Ke TPK bone orientiĝis kaj ĝuste agis, oni povas konstati laŭ la rezultoj. Vere, ekzistis seriozaj malfacilaĵoj laŭ tiu vojo, iam eĉ ŝajne ne supereblaj. Tamen venkis la bona volo al plifortigo de la pacmovado pro la gravaj minacoj sisteme direktataj al subfosado de la tutmonda paco flanke de la imperiismaj rondoj.

Oni povas esti kontenta pri la spirito, kiu regis en la Asembleo. Ĝenerale la problemoj estis diskutitaj en atmosfero kiu certigis al ĉiu parolanto eblecon trankvile kaj sen ia ajn ĝeno argumenti sian pozicion. Estis tre grava la fakto, ke centoj da organizaĵoj kaj movadoj el ĉiuj kontinentoj povis kvar tagojn ofereme kaj serioze studi ĉiuflanke la diversajn aspektojn de la pacproblemoj.

Oni devas emfazi, ke la Asembleo traktis ĉ*iujn* esencajn pactemojn: Vjetnamio; la Eŭropa sekureco; la Mezorienta problemo; Koloniismo, neo-

La Monda Asembleo por la Paco

koloniismo kaj nacia sendependeco; Malarmado. Estas memkompreneble ke en la diskutoj reliefiĝis la diverseco de opinioj. Sed la plej ĝojinda fakto estas la strebo al unueco, ne al eternigo de la diferencoj. Kaj nome tio estas plej necesa por la kooperado de la pacfortoj kaj por plialtigo de ilia kapableco gvidi sukcesajn luktojn por la paco. Nur tiamaniere, per unuigitaj fortoj oni povas pli trafe kontraŭstari al la agresema politiko de la imperiistaj rondoj kaj certigi la fiaskon de ilia danĝerega por la homaro militinstiga agado.

Ni povas raporti al la esperantistaro, ke la Berlina Pac-Asembleo plenumis digne siajn taskojn. Ĝi donis sian grandan kontribuon por la unuiĝo de la pacfortoj kaj respondis al unu treege akra bezono de la homaro. Sufiĉas nur montri ke la Asembleo sukcesis altiri al kunlaborado reprezentantojn de 56 internaciaj kaj 320 naciaj pacorganizaĵoj el 101 landoj. Entute pli ol 1100 delegitoj de tiuj pacorganizaĵoj kaj movadoj partoprenis tre aktive la laboron de la Asembleo kaj ĝiajn kvin komisionoj kun multaj subkomisionoj.

La unuanime aprobitaj Alvoko de la Asembleo kaj Rezolucio pri Vjetnamio montris okulfrape, ke la renkontiĝo de la pacfortoj en Berlino donos novajn impulsojn al la pacbatalo en la tuta mondo.

Tion oni nome celas por konservi la vivon kaj la kulturon de la Homaro. Ni, la esperantistoj, notinde MEM-anoj aktive partoprenis tiun noblan pacmanifestiĝon kaj ni fieras pri ĝiaj rezultoj.

Nun, per ĉiuj fortoj ni agu sub la signo de la „spirito de Berlino“!

(El „Pacaktivulo“)

Kantojn liberajn neniu disbatas

(Wer kann die Lieder der Freiheit verbieten)

Grekaj insuloj, vespera silent'
super la mar', kaj portas la vent'
la melodion de via kant'
el la nokto, al la land'.

Luktas popolo kun la fier'
kontraŭ faŝismo por la liber'
trafos faŝitojn la venka sag'
komenciĝos nova tag'.

Refreno:

Kantojn liberajn neniu disbatas,
nek la faŝisto, nek la ordon',
la popol' ilin ĉiam ja ŝatas
kaj luktas ankaŭ per son'.

(Jürgen Degenhardt)
*Trad. Vivano 1968**

* Vivano estas pseŭdonimo de 15-aĝa lernanto el Neuruppin.

La Monda Asembleo por la Paco

APELO

Ni, reprezentantoj de 56 internaciaj organizoj kaj 320 naciaj organizoj kaj elstaraj personoj, kiuj sentas respondecon por la paco, el 101 landoj, kunvenis de la 21-a ĝis 24-a de junio 1969 en la ĉefurbo de la Germana Demokratia Respubliko, Berlin, en Monda Asembleo por la Paco.

Inspirataj de la volo plifirmigi la mondpacon, ni konferencis en kvin komisionoj pri la nuntempe plej gravaj problemoj de la internacia situacio: Vjetnamio; Eŭropa sekureco; Proksima Oriento; koloniismo; neokoloniismo kaj nacia sendependeco; malarmigo.

Ni konstatis rilate al tiuj problemoj tre ampleksan koincidon de niaj opinioj kaj aplaŭdas al la klariginta interparolo, kiu okazis en libera kaj demokratia spirito. Ni konkordiĝas pro la konscio pri la neceseco koordini kaj plifortigi la agadojn de ĉiuj pacamantaj kaj kontraŭimperiismaj potencoj.

Ni deklaras kiel nian celon garantii al ĉiu popolo en ĉiuj partoj de la terglobo sekurigitan, pacplenan ekziston, homan dignon kaj socialan progreson por la propra utilo kaj utile al ĉiuj aliaj popoloj surbaze de samrajteco, memdecidrajto kaj nacia suvereneco.

Ankoraŭ restas multe farenda por atingi tiun celon, ĉar ni konscias, ke ekzistas multinfluaj fortoj, endanĝerigantaj la pacon. La Unuiĝintaj Ŝtatoj de Americo daŭrigas sian agreson en Vjetnamio. Israelo rifuzas la retiriĝon el okupitaj teritorioj kaj la plenumon de Rezolucio de la Konsilantaro por Sekureco, datita la 22-an de novembro 1967. La naciaj rajtoj de la Palestina popolo ne estas respektataj. Koloniismo, neokoloniismo, faŝismo, neofaŝismo kaj rasismo ankoraŭ ne estas venkitaj. La problemo de sekureco en Eŭropo ne estas solvita. Eŭropo estas partigita en antagonismaj, politikaj kaj militaraj grupoj. Militarismo kaj neonaziismo en la Germana Federacia Respubliko vastiĝas timige. La paco en Eŭropo postulas la respektadon de teritoriaj realaĵoj kaj la kreon de sistemo de kolektiva sekureco, per kio la malligo de blokoj eblus.

La konkura armigo daŭras kaj forprenas grandegajn monsumojn, kiuj devus servi al plibonigo de la vivnivelo de la popoloj. Ni estas konvinkitaj, ke la rolo de la popoloj por la solvo de problemoj de milito kaj paco kreskis. La amasaj agadoj de pacdefendantoj nin kondukis al signifaj sukcesoj en la batalo kontraŭimperialisma. Pro tio ni deziras la multobligon de iniciatoj sur kontinenta kiel ankaŭ regiona kaj nacia niveloj por kunigo de ĉiuj fortoj, kiuj efike volas defendi la pacon kaj la politikan kaj ekonomian sendependecon de la popoloj. Ni alvokas ĉiujn popolojn, ĉiujn homojn kun bona volo per urĝa apelacio, batali kontraŭ ĉiu formo de agresado kaj subpremo.

Nin unuigas la konvinko, ke stabila paco povas esti efektivigata. Ni kunvenis, ĉar komuna agado necesas. Ni konvinkiĝis, ke tio eblas.

El humanisma respondeco por la sankteco de la homara vivo ni deklaras nian decidecon kunstari en unueco.

(Berlin, la 24-an de junio 1969)

La Monda Asembleo por la Paco

REZOLUCIO PRI VJETNAMIO

Ni, la delegitoj de la Monda Asembleo por la Paco en Berlin (21-a ĝis 24-a de junio 1969), reprezentantoj el 101 landoj de la mondo, deklaras:

a) La registaro de USA daŭrigas sian agrespolitikon: Ĝi pliakrigas la militon en Sudvjetnamio kaj plue malobservas la suverenecon kaj sekurecon de la Demokratia Respubliko Vjetnamio. Por efektivigi sian neokolonialisman politikon ĝi subtenas la administracion Thieu-Ky-Huong, kiu neniel reprezentas la sudvjetnamian civitanaron kaj kontraŭstaras ĉiun ajn pacan solvon, kiu respondus al la naciaj bazaj rajtoj de la vjetnamoj. La politiko de la usona registaro estas daŭrigata, malestimante la ĉiam pli insistan postulon de milionoj da homoj tra tutmondo, kiuj ĉiam pli aktive pruvas sian solidarecon kun la heroa kaj triumfa batalo de la vjetnamia popolo. Ili postulas la ĉesigon de tiu ĉi milito, respektante la sendependecon kaj suverenecon de Vjetnamio.

b) La fondo de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko Sudvjetnamio estas okazintaĵo kun signifaj konsekvencoj. Tiu ĉi registaro estas esprimo de la nacia unueco kaj de la legitimaj postuloj de la sudvjetnamia popolo. Ĝi konsentas ekkonsultiĝi kun aliaj politikaj fortoj de Sudvjetnamio por formi provizoran koalician registaron. Ĝi pledas por ordigo de la sudvjetnamia problemo surbaze de la ampleksa 10-Punktoj-Propono de FNL de Sudvjetnamio. Tiu ĉi solvo garantias la rajtojn de la vjetnamia popolo pri sendependeco, suvereneco, unueco kaj teritoria integreco, kiel ili estas fiksitaj en la Ĝeneva Interkonsento de 1954. Ĝi respondas al la nuntempaj realaĵoj en Sudvjetnamio; ĝi same enkalkulas la interesojn de la usona popolo, kiu konstante postulas la ĉesigon de la milito, kiel la devigan premon de ĉiuj en la mondo, kiuj strebas al paco.

La ampleksa 10-Punktoj-Propono sekve estas realisma iniciato, kiu devus ebligi progresojn en la Pariza Vjetnamio-Konferenco cele al ĉesigo de la milito kaj fortigo de la paco en Hindoĉinio, en Sudorienta Azio kaj en la tuta mondo.

Ni, la pertoprenantoj de la Monda Asembleo por la Paco, apelacias al ĉiuj registaroj, ĉiuj naciaj kaj internaciaj organizoj, al ĉiuj elstaraj personoj, ĉiuj popoloj de la mondo, kiuj sopiras pacon, liberecon kaj justecon, doni al la batalo de la vjetnamia popolo pli grandan subtenon kaj ĉiam pli konsekvence postuli, ke la usona registaro ĉesigu sian agresmiliton. En ĉiu lando devus esti organizata granda kampanjo,

- por postuli la oficialan aprobon de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko Sudvjetnamio;
- por postuli de la USA-registaro la komencon de seriozaj intertraktoj ĉe la Parizaj Vjetnamio-Interparoloj surbaze de la ampleksa 10-Punktoj-Propono de FNL;

La Monda Asembleo por la Paco

Pri la laboroj de la MEM-delegitaro

Ni jam koncize raportis pri la partopreno de MEM-delegitaro en la Monda Asembleo por la Paco en Berlino en „der esperantist" nro 32/33. Jen ni publikigas aldonan raporteton de k-do Nikola Aleksiev, Sofia, gvidanto de la delegacio.

La delegitaro de MEM estis ne nur reprezenta, sed ĝi aktive partoprenis la tutan laboron de la Asembleo. La gvidanto de la delegitaro *Nikola Aleksiev* estis en la Prezidantaro de la Asembleo. Li ĉeestis la kunsidojn de la Komisiono pri koloniismo, neokoloniismo kaj nacia sendependeco kaj partoprenis en la diskutoj ĉe la subkomisiono pri neokoloniismo. *A. Balague* kaj *L. Kosieniak* partoprenis la laboron de la komisiono pri Eŭropa sekureco, kie Balague faris paroladon. En la Komisiono pri Proksima Oriento partoprenis Dro *L. Marton* kaj *R. Graetz*, kie la unua faris paroladon En la komisiono pri Vjetnamio parolis *W. Gilbert* kaj en la komisiono pri Malarmado partoprenis *T. Balda* kaj *K. Gusev*. Estis formita speciala Esperantista laborgrupo (vice kun laborgrupoj de sindikataroj, vilaĝanoj, virinoj, parlamentanoj, juristoj, instruistoj, kulturagantoj kaj scienculoj). Je la nomo de nia laborgrupo *N. Aleksiev* faris koncizan raporton antaŭ la konkluda plenkunsido de la Asembleo.

Post la fermo de la Asembleo multaj MEM-delegitoj partoprenis ekskursojn kaj vizitis vidindajn urbojn de GDR, kie ili konatiĝis pli detale kun la sukcesoj de GDR kaj kun la paca strebado de ĝia loĝantaro.

Resume: MEM eliris sur la larĝa vojo al kunlaborado kun gravaj neesperantistaj pacmovadoj kaj tio donos novan impulson al niaj pacamikoj ĉie en la mondo. Nun ni gvidu nian paclaboron sub la signo de la Berlina Asembleo!

N. A.

— por forte preminflui la usonan registaron, lige kun la postuloj pri tuja ĉesigo de la agresmilito en Vjetnamio, pri senkondiĉa retirigo de ĉiuj trupoj de Usono kaj tiuj ŝtatoj, kiuj apartenas al la usona bloko kiel ankaŭ kun la postulo, ke la usona registaro ne plu uzu la Thieu-Ky-Huong-Administracion kiel agresinstrumenton, ke ĝi lasu la vjetnamian popolon ordigi siajn proprajn aferojn sen eksterlanda interveno kaj ke ĝi ĉesigu ĉiujn atencojn kontraŭ la suvereneco kaj sekureco de DRV;

— por subteni la vjetnamian popolon morale, politike kaj materie per vico da efikaj kaj konstantaj agadoj, precipe okaze de la 20a de julio 1969, la 15-a jubileo de la subskribo de la Ĝeneva Interkonsento pri Vjetnamio en 1954.

(Berlin, la 24-an de junio 1969)

La Monda Asembleo por la Paco

Afrikaj partoprenantinoj de la Monda Asembleo

Deklaracio de laborgruppo de Esperanto ĉe la Monda Asembleo por la paco

La laborgrupo de esperantistoj kunvenis kaj priparolis la laboron de nia Asembleo. Ĉiuj oratoroj emfazis la treegan gravecon de la problemoj en la tagordo de l'Asembleo. Unuanime estis esprimita la deziro, publikigi kaj disvastigi la bazajn dokumentojn de l'Asembleo, klarigi ilian enhavon dum naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj, konferencoj kaj kongresoj de la esperantistoj.

Ankaŭ estas decidite garantii la partoprenon de delegitaro de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) en la projektata tutmonda renkontiĝo por la batalo kontraŭ la imperiismo.

Ni konsideras kiel tasko Nro 1 ĉesigon de la agreso en Vjetnamio flanke de Usono, pacan reguligon de l'konflikto en Proksima Orient0 en la spirito de la rezolucio de Konsilantaro de Sekureco de UNO de la 22-a de novembro 1967 kaj ni ankaŭ opinias necesa koncentrigi la atenton ĉirkaŭ la plifirmigo de l'eŭropa sekureco.

(Laŭ komisio de l'laborgrupo de esperantistoj tiun ĉi deklaracion voĉlegis dum la plenkunsido de l'Asembleo la 24-an de junio 1969 la prezidanto de MEM N. Aleksiev.)

25 Jaroj Popola Respubliko Bulgario

La Balkana Duoninsulo ankoraŭ por niaj gepatroj estis sovaĝa necivilizita parto de la terglobo. Ĝi nomiĝis „malantaŭa korto de Eŭropo“. Neimageble, ke la situacio jam post nur 25 jaroj estas esence alia.

La venko de la Ruĝa Armeo super la faŝismo ebligis al la balkanaj popoloj vojon al pli hela estonto.

La 9-a de septembro 1944 estas por la bulgara popolo kulmino de ĝia jarcenta liberiga batalo. La Ruĝa Armeo alportis al Bulgario ne nur la liberigon de faŝismo propra kaj hitlera. Ĝi ankaŭ venkis la nacian dependecon, la jugon de la internacia financkapitalo.

En tiu ĉi jaro la Popola Respubliko Bulgario festas la 25-an jubileon de tiu tago. Inda okazo por retrospektive taksi ĉietapon. Mi ne kompetentas juĝi pri tutŝtataj, ekonomiaj kaj politikaj aferoj. Du okuloj de simpla homo tute ne sufiĉas por rigardi kaj mense kapti aspektojn de 25-jara ŝtata evoluo. Des pli, ĉar ĝi signifas la komencon de la socialisma sistemo. Tiu nova socia sistemo estas la plej kuraĝa kaj samtempe plej necesa nuntempa entrepreno homara. Nur al niaj posteuloj eblos plene kompreni tiujn nunajn jarojn.

Sed — mi vivis en Bulgario. Mi tre proksimis al la animo de Bulgario. Mi almenaŭ parte kaptis la eksplodajn ŝanĝojn en la lando. Kaj ĉefe mi komprenas la bulgarojn. Ne nur laŭ teknike lingva vidpunkto, sed ankaŭ per mia sento. La kono de Bulgario laŭ prospektoj de iu vojaĝoficejo estas tro supraĵa. Bulgario estas pli ol natura paradizo, konsistanta el rozoj, fruktoj, montaroj kaj maro. Ĝi estas lando, pulsanta pro vivoĝojo kaj konstruemo, lernemo kaj kreiveco. Mi vivis du jarojn inter Vitoŝa kaj Nigra Maro, mi spertis multon kaj ankoraŭ ne ĉion. Tamen mi scias, kion signifas 25-a jubileo de liberigo.

Ĉu ne la fakto mem, ke gejunuloj el GDR venas Bulgarion por studi sciencojn, pruvas historian eventon? La popolo, kiu dum jarcentoj suferis sub la turka jugo, kiu poste nur farse ekzistis sur la landkarto, nun kapablas peri plej modernajn sciencajn akiraĵojn.

La helpemo de docentoj kaj profesoroj, de kunstudintoj bulgaraj kaj de ĉiu ajn bulgaro estis neimagebla. Per tio ni fakte forgesis, ke ni troviĝis eksterlande.

Ĉiuj bulgaroj bone sciis, ke ni venas el nova Germanio. Ofte oni demandis „Ĉu vi venas el n i a Germanio?“, komprenigante per tio ke estas pli ol afabla helpemo al eksterlandano. Oni helpis nin kiel fratoj. Eĉ en malgrandaj vilaĝoj cedis



La fama Newski-Katedralo en Sofio



Akvoenergia uzino ĉe Iwailowgrad. la plej granda en suda Eŭropo.

iom da distanceco pro nia germaneco, kiam klariĝis, ke ni nenion komunan havas kun tiuj germanoj, kiuj antaŭ 30 jaroj venis Bulgarion. Ili komprenis, ke ni estas samcelanoj. Ni ĉie sentis, ke niajn du ŝtatojn ligas vere nevenkebla komuneco: la komuna estonto.

Ĉiupaŝe ni vidis la signojn de la nova epoko socialisma: Novaj vilaĝoj kaj urbetoj, stratoj — ne trovigantaj en iu ajn geografia karto, akvobariloj kaj novaj uzinoj, vilaĝaj klubejoj kaj universitatoj, turismaj ripozejoj kaj plenaj magazenoj, ridantaj homoj kaj petolaj infanoj. Teatroj plenaj kaj bibliotekoj plenaj: Jen signo, kiu garantias bonstaton por popolo.

Ĉiupaŝe ni sentis la estimon kaj admiron por sia revolucia pasinteco, por siaj herooj kaj sciencistoj, sed pli ni vivis la fieron pri la floranta kaj prosperanta estanto.

Bulgario, tio estas bastiono de nia socialisma afero. La nuntempa Bulgario, tio estas la spirito de *Dimitrov, Levski, Botev* kaj *Blagoev*. Bulgario — jen nia intima amiko sur la Balkana Duoninsulo.

Dum nur 25 jaroj — tempo, kiu laŭ historiaj mezuroj neniom kalkulas, ĝi iĝis el primokita malantaŭkorta estaĵo fortikaĵo de la socialismo kaj paco.

Ni estas certaj, ke la sekvaj 25 jaroj alportos ankoraŭ pli da sukcesoj kaj prospero al la bulgara popolo.

Gratulon kaj milojn da bondeziroj por niaj bulgaraj geamikoj, por Bulgara Esperanto-Asocio, por la tuta bulgara popolo!

Hans Eichhorn, Centra Laborrondo Esperanto de GDR

Dokumento de
Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio, Hanoi

Abomenaj krimoj kontraŭ militkaptitoj

Laŭ la Liberiga-Informagentejo, la usonaj lakeoj sovaĝe mortigis kaj malhumane traktas la militkaptitojn.

Lastatempe, en Pulo Kondoro, ili efektivigis masakregon. Komence, ili senkaŭze batis 8 militkaptitojn en la korto de la 6a ĉelaro, sektoro A. El la ĉelaroj alkuris militkaptitoj por pridemandi la kaŭzon. La persekutistoj tuj kaptis nombron da aliaj kaj ilin batis. Indigniĝintaj pro iliaj barbaraj agoj la malliberuloj laŭtkriis: „For la senkaŭzaj batoj al militkaptitoj!" „For la sovaĝaj agoj!" Timigite, la marionetaj Soldatoj mobilizis militpolicistojn streĉe ĉirkaŭsieĝi la prizonon kaj per diverstipaj mitraloj kaj mitralegoj M 79 pafi sur la 800 militkaptitojn starantajn en la korto vasta je malpli ol 1 000 kvadratmetroj. Mortis kaj vundiĝis multenombraj militkaptitoj.

Paralele kun la barbaraj masakroj laŭ la menciita tipo, tiu kliko ankoraŭ serĉas ŝtelmortigi militkaptitojn. Ekzemple konduki iujn kaptitojn en la arbarojn sub preteksto de serĉado de brulligno, kie mortigi ilin per batado.

La masakroj de militkaptitoj elmontris la barbaran politikon de la US-marionetoj. En Pulo Kondoro, tagnokte, okazas batoj kaj punoj ĉe ĉiu sektoro de la prizono. Ĉiutage, la militkaptitoj devas manĝi putrajn fiŝaĵojn, ricevas neniun vestaĵon krom la sia, kaj dum malsano profitas neniun medikamenton. En tiu infero de Pulo Kondoro, la sano kaj vivo de la militkaptitoj estas serioze minacataj.

Ni energie denuncas antaŭ la monda opinio la masakregon en Pulo Kondoro, la sekretajn mortigojn kaj malmildajn traktadojn, komplete malhumanajn de la marionetaj trupoj kontraŭ la militkaptitoj malliberigitaj en Pulo Kondoro kaj en la aliaj lokoj.

La ĉi supraj faktoj nudigas la hipokritan fizionomion de la usonaj agresantoj kaj de ties lakeoj. Dum ili parolas pri „reguligoj kaj interkonsentoj koncerne la militkaptitojn", ili mem plej sovaĝe maltraktas kaj murdas niajn kaptitajn patriotojn.

Ni firme depostulas, ke la usonaj agresantoj kaj la marioneta administracio ĉesigu siajn barbarajn agojn kontraŭ la militkaptitoj. Ili devas apliki la diversajn regulojn pri militkaptitoj, garantii la reĝimon de nutrado, de vestado kaj de kuracado, garantii ties vivon kaj sanon, kaj respekti la homan dignon de la militkaptitoj.

Ni alvokas la tutmondan popolon, ke ĝi forte reagu por reteni la sangajn manojn de la usonaj agresantoj kaj de la sajgona marioneta administracio rilate al la militkaptitoj.

Usonaj soldatoj! Pripensu!

La milito en Vjetnamio „estas subtenata de neniu respektinda homo en la mondo. La vera milito estas en nia lando, kontraŭ malriĉeco, senlaboreco, sociaj maljustaĵoj. *(Senatoro Mac Carthy)*

Bertolt Brecht

La soldato de La Ciotat

Post la unua mondmilito ni vidis sur publika placo de la malgranda havenurbo sudfranca La Ciotat, okaze de foiro por festi la alakvigon de ŝipo, la bronzan statuon de soldato de la franca armeo, ĉirkaŭ kiu la amaso premiĝis. Ni alpaŝis pli proksime kaj malkovris, ke estis vivanta homo, kiu tie staris senmove en la varmega junia suno sur ŝtonsoklo, en terbruna mantelo, la ŝtalkaskon sur la kapo, bajoneton sub la brako. Liaj vizaĝo kaj manoj estis ŝmiritaj per bronza farbo. Li movis neniun muskolon, eĉ ne liaj palpebroj tikis.

Je liaj piedoj, apogita al la soklo, estis peco da kartono, sur kiu jena teksto estis legebla:

La statuhomo

Mi, Charles Louis Franchard, soldato en la ... -a regimento, sekve de tersurŝuto antaŭ Verdun akiris la neordinaran kapablon estadi tute senmova kaj konduti dum kiom ajn da tempo kvazaŭ statuo. Tiu ĉi mia arto estis ekzamenita de multaj profesoroj kaj nomita neklarigebla malsano. Bonvolu doni malgrandan donacon al familia patro sen okupo!

Ni ĵetis moneron en la teleron starantan apud tiu ĉi tabulo kaj kapskuante pluiris.

Do, ni pensis, li tie staras, armita ĝisdente, la nedetruebla soldato de multaj jarmiloj, per kiu historio estis farita, li, kiu ebligis ĉiujn grandajn farojn de Aleksandro, Cesaro, Napoleono, pri kiuj ni legas en la lernejaj legolibroj. Jen li. Li ne ekmovas la palpebron. Tiu estas la arkpafisto de Ciruso, la kondukisto de la falĉiletarmitaj veturiloj de Kambiso, kiun la sablo de la dezerto ne povis definitive entombigi, la legiano de Cesaro, la lancrajdisto de Ĉingis-Kano, la sviso de Ludoviko XIV-a kaj la grenadisto de la unua Napoleono. Li posedas la kapablon do ne tiel neordinaran ne montri iun senton, kiam ĉiuj imageblaj detruiloj estas elprovataj ĉe li. Kvazaŭ ŝtono, sensenta (li diras), li estadas, kiam oni sendas lin al morto. Traborita per lancoj el la plej diversaj epokoj, ŝtonaj, bronzaj, feraj, puŝita de batalveturiloj, tiuj de Artakserkso kaj tiuj de generalo Ludendorff, distretita de la elefantoj de Hanibalo kaj la rajdistaj eskadroj de Attilo, frakasita de la flugintaj ercpecoj de la pli kaj pli perfektaj pafilegoj el pluraj jarcentoj, sed ankaŭ de la flugintaj ŝtonoj de la katapultoj, disŝirita de la pafilkugloj grandaj kiel kolombaj ovoj kaj malgrandaj kiel abeloj, li staras, nedetruebla, ĉiam denove, komandita en multnombraj lingvoj, sed ĉiam nescianta kial kaj por kio. La teritoriojn, kiujn li konkeris, li ne ekposedis, tiel kiel la masonisto ne loĝas en la domo, kiun li konstruis. Nek apartenis al li la lando, kiun li defendis. Eĉ ne lia armilo aŭ lia uniformo apartenas al li. Sed li staras, super si la mortpluvon de la aviadiloj kaj la brulantan peĉon de la urbmuroj, sub si la minon kaj la falfosaĵon, ĉirkaŭ si peston kaj batalgason flavkrucan, karna ingo por ĵetita lanco kaj sago, celpunkto, tanka koto, gaskuirilo, antaŭ si la malamikon kaj malantaŭ si la generalon. Nenombreblaj manoj, kiuj teksis al li la kamizolon, frapis la kirason, tajlis la botojn! Nenombreblaj poŝoj, kiuj pleniĝis per li! Nemezurebla kriado en ĉiuj lingvoj de la mondo,

(Daŭrigo paĝo 15)

Der 54. Esperanto-Weltkongreß in Helsinki

La prezidanto de CLR, Rudi Graetz, dum sia parolado

In der Zeit vom 26. 7.–2. 8. 1969 fand in Helsinki der 54. Esperanto-Weltkongreß statt, an dem über 2000 Esperantisten aus 40 Ländern aller Kontinente teilnahmen. Die DDR war durch eine Delegation vertreten, der Handelsrat *Rudi Graetz*, Vorsitzender des Zentralen Arbeitskreises Esperanto der DDR im Deutschen Kulturbund, *Hans Eichhorn*, Arzt und Vorsitzender des Jugendausschusses des ZAK, und *Detlev Blanke*, Sekretär des ZAK, angehörten.

Sicher war Finnland als Kongreßland aufgrund seiner verständigungsbereiten und realistischen Außenpolitik gut geeignet. Denn welchen bewußt lebenden Esperantisten interessieren nicht die Probleme der europäischen Sicherheit, um deren Lösung sich auch Finnland aktiv einsetzt.

Für die Bedeutung, die man in Finnland dem Weltkongreß beimaß, mag die Tatsache sprechen, daß die Schirmherrschaft der finnische Staatspräsident Dr. *Urho Kekkonen* übernommen hatte. An der **feierlichen Eröffnung** des Kongresses in der Messehalle der Stadt nahmen diplomatische Vertreter aus 14 Ländern teil. 11 von ihnen richteten Grußansprachen im Namen ihrer Regierungen an den Kongreß. Es sprachen u. a. die Botschafter Polens, Ungarns, Bulgariens und ein Beauftragter der Regierung der Slowakischen Sozialistischen Republik.

Im Auftrage der Regierung der DDR begrüßte Gesandter *Heinz Oelsner* den Weltkongreß. Er führte unter anderem aus:

> *„Es ist mir angenehm, Ihnen mitteilen zu können, daß im 20. Jahr der Existenz der Deutschen Demokratischen Republik neben anderen Schriftwerken in beachtlicher Auflage ein Buch in Esperanto erscheinen wird, das den Titel trägt „Die DDR – Bilder und Tatsachen". Mit Genugtuung haben wir festgestellt, daß Sie Ihren Kongreß in diesem Jahr in einem Lande abhalten, von dem wesentliche Impulse zur Sicherung des Friedens in Europa ausgehen.*

Im Auftrage meiner Regierung möchte ich Ihnen versichern, daß die dem Frieden dienenden Ideale der Esperantisten auch in Zukunft in unserem sozialistischen Staate entsprechend seiner in der Verfassung verankerten friedliebenden und völkerverständigenden Politik anerkannt und unterstützt werden.“

Der Vorsitzende des Zentralen Arbeitskreises Esperanto, *Rudi Graetz*, begrüßte den Kongreß im Namen der Esperantisten der DDR. Beide Redner erhielten starken Beifall.

Über 60 Veranstaltungen fanden in dem bizarren Kongreßgebäude „Dipoli“ und in der Technischen Hochschule statt. Es waren Veranstaltungen, wie sie für alle Universellen Esperanto-Kongresse bisher typisch sind. So fehlten weder die Zusammenkünfte der MEM (Weltfriedens-Esperanto-Bewegung), der Lehrer, Eisenbahner, Jugend und Studenten, Juristen, Mediziner, Wissenschaftler und anderer Fachorganisationen noch die bekannten Veranstaltungen wie der Rednerwettbewerb, Vorlesungen der Internationalen Sommer-Universität, Theaterveranstaltungen und künstlerische Wettbewerbe (Dichtkunst).

Im Rahmen der **Internationalen Sommer-Universität** werden alljährlich wissenschaftliche Vorlesungen zu Spezialthemen gehalten. Diese anspruchsvollen Vorlesungen sind ein Beweis für die Tauglichkeit des Esperanto als Sprache der Wissenschaft und tragen zur Entwicklung der spezifischen Fachsprachen bei.

Es seien einige Vorlesungen genannt. *Prof. Dr. Kääriäinen* (Geodätisches Institut Finnlands) sprach über *„Form und Größe der Erdkugel“*. Magister *V. Setälä*, Finnland, Mitglied der Akademie des Esperanto, referierte zum Thema *„Die finnische Sprache und Esperanto als Schlüssel zum Sprachenstudium“!* Der bulgarische Diplom-Ingenieur *Simeon Simeonov*, Mitarbeiter am Forschungsinstitut für Transport in Sofia, legte in seinem Vortrag die Probleme *„der aktuellen wissenschaftlichen Information und Dokumentation“* dar. *Prof. Dr. Armand*, Moskau, hielt ein wissenschaftliches Referat über die *„Rationelle Nutzung und Konservierung der Naturquellen unseres Planeten“*. *Prof. Dr. A. Thewrewk*, Vizedirektor eines astronomischen Observatoriums in Budapest, skizzierte *„Dante und die Naturwissenschaften“*.

Von herausragender Bedeutung war die Tagung der **Weltfriedens-Esperanto-Bewegung (MEM)**. Sie wurde von über 200 Esperantisten aus ca. 35 Ländern besucht. Ein finnischer Arbeiterveteran eröffnete die Konferenz und charakterisierte in seiner Ansprache die den Frieden gefährdenden Machenschaften des Imperialismus besonders in Vietnam, Israel und in Europa. Er ging dabei auch auf die Notwendigkeit ein, den Status quo in Europa zu akzeptieren. Der Präsident der MEM, *Nikola Aleksiev*, Bulgarien, gab den Bericht des Sekretariats der MEM und wertete das Welttreffen für den Frieden in Berlin aus. Er plädierte dabei für eine breite Unterstützung der Dokumente des Weltfriedenstreffens durch die Esperantisten. N. Aleksiev legte der Konferenz einen Resolutionsentwurf im Sinne des Weltfriedenstreffens vor. Besondere Bedeutung erhielt die Konferenz dadurch, daß der *Sekretär des Weltfriedensrates, Yves Choliere*, teilnahm und die Bedeutung des Berliner Treffens für die Schaffung einer breiten Aktionseinheit aller Friedenskräfte darlegte.

Rudi Graetz ging in seinem Diskussionsbeitrag auf die Bedeutung der Anerkennung der DDR für die europäische Sicherheit ein. Viele Diskussionsredner unterstützten die Ausführungen des Vertreters der DDR.

Nach eingehender Diskussion der aufgeworfenen Fragen wurden der Abschlußappell und der Vietnamappell des Berliner Friedenstreffens sowie der vorgelegte Resolutionsentwurf von den Konferenzteilnehmern einmütig gebilligt.

Zwei Ausgaben des „*Paco*“ waren die meistgelesenen Esperanto-Zeitschriften auf diesem Kongreß. Die *sowjetische Ausgabe* (1968) und die *DDR-Nummer* dieses Jahres fanden starkes Interesse bei vielen Kongreßteilnehmern.

Als eine neue Einrichtung des Weltkongresses kann die **„öffentliche Debatte“** angesehen werden, die unter dem Thema „*Esperanto — ein ideologisches oder praktisches Instrument*“ stand. Die Wahl dieses Themas ist sicher auf die Forderung vieler fortschrittlicher Esperantisten nach Auseinandersetzung mit wichtigen gesellschaftlichen Fragen zurückzuführen. Solch eine Debatte ist zu begrüßen. An ihr nahmen ca. 20 Redner teil, unter ihnen *D. Blanke* als Sprecher der DDR-Delegation. Er berichtete über die erfolgreiche Teilnahme einer Delegation der MEM am Berliner Weltfriedenstreffen und setzte sich für eine aktive Mitarbeit aller friedliebenden Esperantisten in der internationalen Friedensbewegung ein.

Der diesjährige **Rednerwettbewerb** war für die DDR ein voller Erfolg. *Hans Eichhorn* belegte mit seinem Beitrag über „*die gesellschaftliche Bedeutung der Kosmosforschung*“ den ersten Platz. In seinem Beitrag wies der Redner nach, daß mit der technischen Leistung der amerikanischen Mondlandung durchaus kein neues Zeitalter begonnen hat. Die anerkennenswerte Pioniertat dürfe nicht propagandistisch mißbraucht werden, um von der Existenz von Kriegsherden und krassen sozialen Mißständen auf der Erde abzulenken.

In der Sitzung der **Esperanto-Weltjugend (TEJO)** unterstützte der Sprecher der DDR die Bemühungen der TEJO, aus der Neutralitätsisolierung herauszukommen und sprach sich für ein Engagement für den Frieden aus, das immer konkret sein müsse. In den Tagungen der *Studenten*, der *Wissenschaftler*, der *Mediziner* und anderer Fachorganisationen überbrachten die Vertreter der DDR ebenfalls die Grüße ihrer Republik und arbeiteten mit Diskussionsbeiträgen mit.

Auf dem Kongreß wurden zwei *sowjetische Filme* gezeigt, die in Esperanto synchronisiert waren. Ein Film zeigte seltene Dokumente über Lenin.

Neben vielen anderen offiziellen Veranstaltungen, die alle aufzuzählen unmöglich wäre, fanden natürlich auch Unterhaltungsprogramme statt. Hervorgehoben werden muß der **„finnische Abend“**, der einen vielfältigen Einblick in die finnische, wohl typisch nordeuropäische Folklore gab. Die **Theateraufführungen** waren sprachlich zwar perfekt aber inhaltlich gänzlich unbedeutend.

Parallel zum 54. Weltkongreß fand der **37. Internationale Kongreß blinder Esperantisten** statt, an dem sich 112 Blinde aus 14 Ländern beteiligten.

Die finnische Presse berichtete ausführlich vom Kongreßgeschehen. Jeden Tag sendete *Radio Helsinki* Informationen aus aller Welt in Esperanto.

Der diesjährige Weltkongreß war für die DDR sehr erfolgreich. Das wirkungsvolle Auftreten des Gesandten der DDR in Finnland und die Arbeit der Delegation auf dem Kongreß ließ an der Existenz der souveränen DDR keinen Zweifel. Dieser Erfolg, und das muß hervorgehoben werden, wurde durch die hervorragende freundschaftliche Zusammen-

arbeit der Delegationen der sozialistischen Länder sehr begünstigt. Eine Zusammenarbeit, die getragen war vom Geist der Moskauer Beratung, die sich weiterentwickeln und gute Früchte tragen wird.

Finnland war ein sehr freundliches Gastland, ist es doch ein gutes Beispiel für die friedliche Koexistenz in der Praxis. Die Finnen wissen sehr gut zwischen den beiden deutschen Staaten zu unterscheiden. Sie waren über die Friedenspolitik der DDR gut informiert. Das kam in vielen freundschaftlichen Gesprächen mit finnischen Esperantisten zum Ausdruck. Ein besonderer Dank sei an dieser Stelle auch den beiden finnischen Esperantisten *Reino und Erkki Järvinen*, echten Freunden der DDR, ausgesprochen, die als Mitglieder des Kongreßkomitees der DDR-Delegation ständig mit Rat und Tat zur Seite standen.

Möge Helsinki recht bald der Ort einer sehr wichtigen Konferenz werden, der Konferenz der europäischen Sicherheit. *D. Blanke*

Soveta Respubliko enkondukas Esperanton

Unu el la respublikoj de Soveta Unio, nome la Litova Soveta Socialisma Respubliko ĵus enkondukis la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en siajn mezgradajn lernejojn. Ĝis antaŭ nur kelkaj monatoj neniu lernejo de Soveta Unio oficiale instruis la lingvon.

La nova decido, anoncita per aparta 40-paĝa broŝuro de la Litova Ministerio de Klerigo en 3000 ekzempleroj rezultigis urĝan bezonon de instruistoj. Tamen jam en 19 lernejoj povis komenci la instruado, kaj la nombro sendube rapide kreskos.

Laŭ la nova programo, Esperanton povas lerni la klasoj 7-a ĝis 11-a. La instruado estas libervola, t. e. oficiala sed ne deviga por ĉiuj lernantoj. La oficiala kurso konsistas el 52 lecionoj po 11/2 horoj semajne. La ministeria dokumento atentigas, ke la Internacia Lingvo estas lingvo „plej rapide lernebla el ĉiuj lingvoj de la mondo“ kaj ke ĝi donas bonan bazon por posta lernado de aliaj lingvoj. *(El „Bulgara Esperantisto“)*

(Daŭrigo de paĝo 11)

kiu spronis lin! Neniu dio, kiu ne benis lin! Lin, kiu estas infektita per la terura lepro de la pacienco, kavigita per la nekuracebla malsano de la sensentemo.

Kia tersurŝuto, ni pensis, estas tiu, al kiu li dankas tiun ĉi malsanon, tiun ĉi timigan, monstran, tiel treege infektan malsanon?

Ĉu ĝi eble, ni demandis al ni, ne tamen estas kuracebla?

Trad. Dr. Karl Schulze
(El „Kalendergeschichten“, Aufbau-Verlag Berlin 1958)

Gratuloj de soveta amiko

La prezidanto de la Esperanto-Komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio, k-do Petro Poliŝĉuk, sendis al ni fratajn gratulojn okaze de nia ŝtata jubileo. Jen lia mesaĝo jubilea:

La unuan fojon en la historio

La unuan fojon en la historio,
Post milito kaj batal' aŭdaca,
En la mond' kreiĝis Germanio,
Demokrata, aspiranta Pacon.

Jes, kreiĝis nova Germanio
Sur popola, firma fundamento,
Kie regas vera harmonio,
Kie regas kolektiva sento.

Kie hom' por homo estas frato,
Laboruloj vivas sen subpremo,
Kie homoj estas estimataj
Ne pro mono, sed pro laboremo.

Baldaŭ venos datreveno glora,
Ĝin solenos en la tuta mondo
Geadeptoj de la ruĝkoloro —
Klaskonscia, laborula rondo.

Kaj deziras mi, al vi, gefratoj,
Longan vivon kaj bonegan sanon!
Go Do Ro, la lando estimata,
Premas mi honestan vian manon!

Premas mi kaj firme ĉirkauprenas
La popolon de la lando frata!
Scias mi, feliĉo nepre venos,
Se ĝi estas iel aspirata.

Kaj mi scias, venos la momento —
Unuiĝos la popol' germana!
L'Oriento kaj la Okcidento
Iros kune, frate, man' ĉe mano!

Petro Poliŝĉuk

Erwin Schleusener

Kiam la kongreso de la Germana Laborista Esperanto Asocio okazinta Paskon de 1930 decidis transporti la sidejon de la asocio de Leipzig al Berlino, ĝi konsideris ke tio permesus al la esperantista movado, proksime de la aliaj laboristaj organizaĵoj en la ĉefurbo de la lando, havi pli bonan kontakton kaj pli grandan efikon.

La berlinaj esperantistoj sukcesis formi estraron el junaj kaj entuziasmaj elementoj, preskaŭ ĉiuj laboristoj.

Inter ili estis *E. Schleusener.*

Estas necese omaĝi la tre aktivajn kaj spertajn gekamaradojn de la granda grupo de LEA de Leipzig, kiuj dum multaj jaroj kaj dum malfacila periodo lerte gvidis la asocion. Konvenas ne forgesi tiun periodon, ĉar la leipzigaj gekamaradoj montris sian grandan talenton kaj la obstinon de sia karaktero.

Nia sidejo en la centro de Berlino, senluksa sed spaca oficejo vidis ofte, ĉu dumtage, ĉu vespere niajn junajn amikojn pretaj al iu laboro. Laboro kiu ne mankis ĉar nia movado estis en plena floro. Nia sekretario, Ernesto Kissler, se iis repartigi la taskojn kaj estis dankema pro tiu helpo, kiun niaj junuloj ofertis al li.

Kaj. *E. Schleusener* estis konstante inter ili.

Instigita per sia klaskonscio de laboristo kaj per la fervoro por la internacia lingvo, tiu senpartiulo donis multe de sia tempo kaj forto por nia movado.

En februaro de 1933 la naziistoj fermis la sidejon de nia asocio akaparante al si ĉion kion ili trovis en ĝi. Ekzistis kamaradoj, kiuj ne konsentis ĉesi sian batalon kontraŭ la plej teruraj malamikoj de la laborista klaso kaj de la paco, kaj formis grupojn por daŭrigi la kaŝan, subteran kaj tiom danĝeran lukton kontraŭ la faŝistoj. Ili ekkonis la eblon konatigi per la internacia lingvo al la ekstera mondo la teroron kaj la koncentrejan realecon de la hitlera reĝimo.

Unu el la plej aktivaj estis *E. Schleusener.*

Preskaŭ mirakle li sukcesis savi sian vivon, sed ne sian sanon trans tiu malhela periodo, dum kiu ankaŭ li, kiel ĉiuj, estis devigita soldatiĝi. Sur la soveta fronto li dizertis la armeon kaj libervole iris en militkaptecon. Reveninte en sian hejmlandon en 1947 li senhezite partoprenis al la rekonstruado, sur demokratia kaj socialisma bazo, de la nova Respubliko, el kiu neniam plu ekestos milito. Ĝis la lasta momento de sia vivo li laboris kun ni en la Centra Laborrondo Esperanto de la Germana Kulturligo, eĉ kiam li pene devis vojaĝi ĝis la konferencejo.

La 12-an de aŭgusto ni adiaŭis solene kaj emocie de liaj cindroj en la kremacia tombejo de Berlino. *W. Vildebrand*

Kiu scias raporti pri la sorto kaj la batalo de similaj meritplenaj laboristo-esperantistoj kiel nia elmondiĝinta k-do Erwin Schleusener? *La red.*

La vojo de nia soveta Esperanto-flago

Estis dum oktobro de la jaro 1929. En niaj lokaj gazetoj laboristaj aperis artikolo, kiu invitis interesulojn lerni Esperanton, la internacian lingvon. Cirkaŭ 30 personoj kolektiĝis, el kies kerno formiĝis la unua laborista esperanto-grupo de *Greiz*.

Dum aprilo 1930 mi aliĝis al nia Germana Laborista Esperanto Asocio. Kun geamikoj el diversaj landoj ni interŝanĝis leterojn kaj kartojn. Precipe kun amikoj el Sovetunio ni havis regulan kaj fortan kontakton.

La laboristo *Izak Klejman el Simferopolo* baldaŭ estiĝis mia plej kara kaj fidela korespondamiko. Por plifortigi la amikecon inter la geamikoj el Simferopolo kaj Greiz ni interŝanĝis laŭ la propono de Izak, dum printempo 1931, flagojn.

En oktobro 1930 estis en Greiz fondita la LEA-grupo, al kiu aliĝis 22 amikoj. Ni pretigis nian flagon, kiu devis iri kiel donaco al Sovetunio. Sur la ruĝan ŝtofon ni pentris la devizon: „Sur vojo de Lenin ni batalos por la Socialismo".

Post kelkaj semajnoj alvenis el Simferopolo simila donaco, pri kiu ni ege ĝojis. Post kelkaj malfaciloj kun la doganejo, kiu postulis altan dogansumon, ni sukcesis. Jena devizo estis surpentrita sur la amika flago el Sovetunio: „Proletoj de ĉiuj landoj unuigu vin. Lernu Esperanton, la lingvo por tutmonda interfratiĝo. USSR-Germanio. Al la germanaj kamaradoj en Greiz-Irchwitz. De la laboristoj el Simferopol". La teksto estis ruslingva kaj esperanta.

Pasic la tempo. Malfacilaj horoj por revoluciaj laboristoj venis.

La 16an de Marto 1933 antaŭtagmeze okazis ĉe mi la unua domtraserĉado. Bela printempa vetero helpis nin. Nia sesjara knabino Jutta estis bone informata. La lasta faŝisto ankoraŭ ne troviĝis en la domkoridoro, kiam Jutta tra la porteto forlasis la ĝardenon, por veturi pupinfanojn sur la strato malproksime de nia domo. En la veturilo sub la pupoj, enkudrita en ŝtofo ripozis la simbolo de nia grupo. Dum tia tago traserĉis la faŝistoj la loĝejojn de kvar geamikoj el nia grupo. Do, ni rimarkis, la restado por nia flago en la urbo kaj antaŭlokoj estas tro danĝera. Sed kien?

La fidelaj geamikoj *Kurt* kaj *Hedwig Drehmann* sciis helpom. La gepatroj de Hedwig estis kamplaboristoj, ili laboris ĉe grandbienulo, loĝis sole en malgranda dometo, ĉirkaŭita de ĝardeno.

Kurt preparis la „ŝtalĉevaletojn" kaj forlasis la loĝejon kun Hedwig. La flago estis volvita ĉirkaŭ la korpo de Hedwig. La patrino preskaŭ ne ekkonis Hedwig, tiel dika estis la filino. Sed baldaŭ solviĝis la enigmo.

Tamen, la flago ankoraŭ ne estis sekura. Kurt konstruis post kelka tempo dometon el ligno por birdoj. Tien li enmetis la flagon. Sur alta pira arbo, gardita de familio sturno, nun ripozis nia simbolo.

Forpasis la jaroj. Venis la milito. La imperiistoj profitis el sango . . .

La juna frato de Hedwig ne restis knabo. Li kreskis kaj kuraĝiĝis. En la arabaro nenia kornika nesto estis tro alta por li.

Dum iu aŭtuna tago li forprenis la pirojn de la arbo kun la birdokesto. Sciavide li rigardis la dometon. Por purigi kaj ripari li terenprenis ĝin kaj rimarkis, ke en la dometo troviĝis „kelo". La patrino, ĉion observinte, malhelpis pluan esploron kaj sendis la junu-

lon al vendejo en la proksima vilaĝo. Dum la sama vespero nia flago ricevis alian hejmon. En la domo de fratino de Hedwig troviĝis la nova kaŝejo.

La venkintaj soldatoj de la Ruĝa Armeo detruis la „miljaran“ faŝisman regnon.

La enmarŝantajn sovet-soldatojn salutis flirtanta soveta flago.

Komencis la nova epoko por Germanio. Fondiĝis la unua germana ŝtato de paco. Dum solena horo ni transdonis dum marto 1950 al nia distrikta partia lernejo en Greiz la al ni tiel karan flagaon. Tie, kie la plej aktivaj partianoj lernas por la konstruado de la socialismo, certe estas la plej taŭga loko por nia simbolo.

(verkita de Herbert Trummer †, februaro 1968)

* * *

Historiaj standardoj

Okaze la 100-a naskiĝtago de V. I. Lenin aperos en GDR germanlingva broŝuro pri historioj de standardoj donacitaj iam de sovetaj al germanaj laboristkolektivoj. Certe ankaŭ partoprenis aŭ eĉ organizis standardinterŝanĝojn Esperantistoj. Pri aktiva partopreno de iamaj laboristaj Esperantistoj ĉe tiaj standardinterŝanĝoj tamen nur malmultaj faktoj estas konataj. Utilas dokumenti partoprenon de Esperantistoj ĉe interŝanĝoj de standardoj, per tio pruvante, ke Esperanto por progresemaj Esperantistoj ne estis simple hobio sed instrumento helpanta fortigon de la internacia laborista batalfronto. Esperantistoj de GDR kaj ankaŭ alilandaj amikoj subtenu nin kaj sendu memoroin, laŭeble kun fotoj kaj aliaj dokumentoj, al: *Otto Bäßler, 7022 Leipzig, Krokerstraße 15.*

J. M. Lermontov

VELO

Soleca velo blanke helas
En la nebula mara blu' –
Ĝin kio de l'hejmlando pelas
Kaj pelas al fremdlandoj plu?

La ondoj ludas, fajfas vento,
La masto krake fleksas sin:
Ho, ne feliĉo ĝin atendas,
Kaj ne feliĉ'postrestis ĝin.

Sub ĝi lazura flu' striforma,
Kaj supre – ora suna spac'
Sed ĝi, ribela, vokas ŝtormon,
En ŝtormo kvazaŭ estus pac.

(1830)

Vilnius

Trad. B. Berin

Ni plibonigu nian stilon!

En la direktivoj de la Germana Kulturligo pri la taskoj de la Esperanto-amikoj estas dirite ke ni devas klopodi por atingi altan lingvan nivelon. Por bone kaj sukcese plenumi nian taskon ni bezonas kompetentajn kaj spertajn esperantistojn. Ni scias ke tiaj ekzistas en la tuta lando kaj ni nek volas nek povas rezigni pri ties kunlaboro. Por plibonigi la lingvan nivelon de niaj anoj ni aperigos en tiuj ĉi paĝoj konsilojn kaj sugestojn.

Lingva kvalito en tradukado

Traduki, tio estas transponi tekston en fremdan lingvon tiel kiel oni parolus aŭ skribus ĝin en la sama kunteksto, en simila cirkonstanco, en sama medio. Tial la tradukanto devas bonege posedi la lingvon tradukotan kaj absolute koni kaj senti la nuancojn de la originalo.

Li devas taksi kiomgrade li povas resti fidela al la originalo kaj kiam kaj kiom li povas devojiĝi de ĝi. Ofte estas necese traduki libere, sed la tradukanto devas senti, kie troviĝas la limo. Beletro kaj poezio toleras pli grandan liberon, sed teksto scienca, politika aŭ ekonomia postulas grandan konformecon.

Jen, kion la fama esperantisto kaj esperantologo sinjoro *F. Faulhaber* diras pri la fideleco al originala teksto:

„... Tradukante oni estas sub la influo de l'originalo kaj tiu influo kaŭzas komplikan frazkonstruon, malbele sonantajn vortkombinojn, ktp. Tial la certe laŭdinda penado precize sekvi la originalon, ne ĉiam donas al la leganto la saman impreson. Ofte oni povas per malpli preciza sekvado akiri pli precizan rezultaton. La tradukanto ja devas redoni ne nur nudajn faktojn, sed ankaŭ la atmosferon, la sentojn, la emocion kiun la aŭtoro de la originalo volas sentigi aŭ veki en la leganto.

Pro tio ne ĉiam sufiĉas tradukado laŭvorta."

Aŭ, la sama aŭtoro aliaparte:

„... La tradukanto ja volas sekvi la originalon kiel eble plej precize. Tio estas, kompreneble, laŭdinda, sed li ne malatentu, ke la enhavo konsistas ne nur el vortoj, kiujn li devas anstataŭigi per vortoj el alia lingvo, sed ankaŭ el sentoj, impresoj, emocioj, atmosfero, ktp. kiuj kune kolorigas kaj nuancas la vortojn, la tutan tekston kaj tiel elvokas en la leganto plenan bildon de tio, kion la aŭtoro volis diri. La tradukanto devas redoni tion. Por tion atingi, la tradukanto ofte devas iom flankeniĝi de la originalo, ĉar la esprimpovo, la esprimmaniero kaj la esprimforto en la diversaj lingvoj ne estas ĉiurilate egalaj. Por ke iu vorto aŭ teksto reliefiĝu, la tradukanto ne malofte devas modifi la tekston."

Ni metis la problemon de bona tradukado en la unuan rangon de niaj pripensoj ĉar ĝi estas tre grava en nia aktuala laboro.

Kelkfoje necasas dividi tro longan frazon, aliafoje estas rekomendinde fari el du frazoj unu.

Ekzistas vortetoj, kiujn oni prefere ne tradukos, en alia kazo la elvokiveco de la teksto gajnus se oni aldonas vorteton. En la germana lingvo abundas vortetoj kiel: *ja, doch, nun, mal* ktp. kiuj kelkfoje donas nuancon al la esprimpovo de la frazo, tamen ofte estas superfluaj.

Povas esti ke pluralon (kiu ofte estas uzata en germana lingvo) vi tradukos efike per singularo. Kelkfoje la tiom ŝatata en germana lingvo pasiva formo pli bone tradukiĝas per la aktiva formo, ekzemple:

„*Estas petate ne fumi tie* ĉi“, anstataŭ „*Oni petas ne fumi tie* ĉi“ aŭ „*Ni petas ke oni ne fumu tie* ĉi“.

Resume: Ne ekzistas recepto aŭ ŝablono por sukcese traduki. Tradukado estas afero de rutino kaj sperto. Estas rekomendinde traduki individue, eĉ longan tekston por savgardi la unuecon de la stilo, kaj kolektive kontroli kaj eventuale modifi la tekston. Antaŭ ol komenci la traduklaboron estas bone prepari la menson per legado de esperanta teksto kaj tiamaniere kutimiĝi al la lingvo tradukota.

Ni majstru la lingvon!

La esperantistoj devas scipovi klare kaj senpeke esprimi siajn pensojn, respekti rigore la gramatikajn regulojn, distingeble kaj korekte prononci la lingvon, sin servi de trafaj terminoj kaj disponi pri sufiĉe riĉa vortotrezoro. Ili devas majstri la lingvon por esti utilaj al la movado kaj al nia Respubliko kaj por povi instrui la internacian lingvon.

Praktikante nian lingvon longtempe oni kutimiĝas pensi en ĝi. Pensi kaj paroli interdependas. Same okazas se oni restadas en eksterlando, kiukaze, asimilante la fremdan lingvon oni fine pensas en ĝi. Longa kaj seninterrompa uzado de Esperanto kondukas al la sama fenomeno, oni fine pensas en Esperanto kaj sekve oni parolas la lingvon flue kaj senpene. Pensante germane ni inklinas traduki mense tion kion ni volas esprimi en Esperanto. Kaptitoj de nia nacia lingvo, kiunni parolas senĉese, ni suteras malfacilaĵojn por bone kaj trafe esprimi nin en Esperanto.

La lingvopurigistoj ekde la unua mondmilito eliminis, pro ŝovinistaj motivoj, la tre abundajn fremdajn vortojn kiuj svarmis en la germana lingvo kaj estis komune uzataj sen kiu ajn diskriminacio. Oni anstataŭis tiujn internaciajn vortojn per germanaj kiujn ofte oni devis inventi. Depost tiu tempo multe da nekleraj personoj ne plu kapablas kompreni internaciajn vortojn. Tamen sur la tereno de la tekniko kaj scienco oni apenaŭ povas abstini de la uzo de internaciaj terminoj.

Tial estas rekomendinde ke, tradukante iun verkon kaj serĉante la konvenan terminon ni cerbumu ĉu ne ekzistas adekvata internacia termino, anstataŭ produkti vortomonstrojn.

Mi opinias ke la aglutina karaktero de la germana lingvo kaj ĝia fleksibla sintakso kondukas al misuzo kaj ofte faras la esperantan tekston peza kaj malfacile komprenebla.

Tiuj kiuj jam tradukis germanlingvajn tekstojn en Esperanton aŭ en alian lingvon povis rimarki kiom malfacila estas traduko el la germana esperanten pro la komplikeco de la originala teksto. Tamen, la grandaj klasikuloj de la germana lingvo kaj literaturo en la moderna tempo precipe *Engels* kaj *Mehring*, sukcesis uzadi la lingvon kun majstreco kaj esprimis la problemojn la plej malfacilajn en lingvo ekstreme simpla kaj per stilo eleganta.

Klarecon!

Ni devas strebi klare kaj koncize esprimi niajn ideojn. Tio kion ni volas diri en la internacia lingvo devas esti komprenata de multe da personoj kies gepatra lingvo kaj pensmaniero diferencas de nia germana kaj esperanta parolado. Tial la plej ebla klareco pri la terminoj estas necesa.

Ni komencas kaj daŭrigos sur tiuj ĉi paĝoj publikigi aron da vortoj kies senco ne ĉiam ŝajnas esti klara aŭ kiuj povus esti interŝanĝataj kun aliaj.

Ni akiru bonan stilon!

Paroli aŭ skribi bonstile estas necese ĉar ni volas komuniki al leganto aŭ aŭskultanto niajn ideojn. Ni volas konvinki lin. Per malbona esprimmaniero ni malutilas al tiu celo. Bona stilo estas ĝentileco kiun ni ofertas al alia persono. Kvankam la vortordo en Esperanto estas libera, tamen ekzistas konvencia vortordo kiu respondas al la bezono de internacia lingvo. La logika sinsekvo de subjektivo, predikato kaj komplemento faciligas la komprenon kaj malpezigas la stilon. Certe, por emfazi iun frazparton, ŝanĝo de la vortordo povas esti necesa. Longaj interfrazoj povas malhelpi la fluan kompreneblon de la teksto. Adverbo avantaĝe trovos sian lokon proksime de la verbo kiun ĝi reliefigas. La frazoj devas laŭsence kaj logike sekvi unu la alian, esti separitaj aŭ interligitaj per propozicio unuj de aliaj. Koncizecon de la teksto oni atingas per forlaso de neutila balasto. Jen kion Sinjoro *Faulhaber,* skribas pri simpla stilo: *„... Ju pli simple ni esprimas nin, des pli facile oni nin komprenas. Frazo kiun oni devas relegi por kompreni ĝin, ne estas bonstila, ĉar bona stilo neniam ĝenas la legadon, sed male, ĝin faciligas. Ankaŭ de parolanto ni atendas, ke li parolu klare kaj tuj kompreneble, ĉar malklaran frazon skribitan ni povas relegi, sed parolanton ni ne povas interrompi por peti, ke li rediru la lastan frazon!...“*

Belsoneco

Evitu longajn vortojn! La kunmeto de vortoj ne devas esti troigita. Jen kelkaj malbonaj ekzemploj kaj plibonigaj sugestoj:

Glacikampbalaisto	*glitkureja balaisto*
petrolpendlampo	*pendanta petrola lampo*
ĝardenpiedvojo	*ĝardena vojeto*
aŭtomobilveturlernejo	*lernejo por veturi aŭtomobile*
fremdultrafikoficejo	*oficejo de turismo*

Evitu interpuŝiĝon de sonoj precipe de konsonantoj:

Amaso da konsonantoj malbone sonas al multaj popoloj. Tiel ekz. la francoj faris el la angla *beefsteak* la vorton *biftek,* la hispanoj por la sama vorto *bistek.* Hispanoj pro la sama antipatio de amasigo de konsonantoj transformis *pneŭmatiko* en *neŭmatico, psalmo* en *salmo, pseŭdo* en *seŭdo.*

Jen kelkaj ekzemploj kolektitaj de *Faulhaber* en sia libro „Ne tiel — sed tiel ĉi“:

Lingvekzerco	*lingva ekzerco*
akvfalo	*akvofalo*
flugkapablo	*fluga kapablo aŭ kapablo por flugi*
lavvazo	*lavovazo*
bazsigno	*baza signo*
klasstrukturo	*klasa strukturo*
bazcifero	*baza cifero. ktp.*

Simila fenomeno, kiu malutilas la belsonecon de la lingvo estas la amasigo de siblaj sonoj kiel s, ŝ, c. ĉ.

Jen ekzemplo por demonstri nepripensitan amasigon de siblaj sonoj: Faulhaber en „Ne tiel — sed tiel ĉi“.

„Ŝi rigardis al la amaseto da infanvestoj ĝis ĉio komencis turniĝi ĉirkaŭ ŝi kaj ŝi ŝanceliĝante serĉis apogon.“

Troa ripetado de pronomoj povas esti avantaĝe evitata per apliko de gerundio:

Post kiam li estis trinkinta la vinon, li foriris kaj klakigis la pordon.	*Trinkinte la vinon, li foriris, klakigante la pordon.*
Li aŭskultis la muzikon dum kiam li laboris.	*Laborante li aŭskultis la muzikon. Aŭ: Aŭskultante la muzikon, li laboris.*
Mi konas personojn, kiuj koleros, kiam ili ekscios tiun novaĵon.	*Mi konas personojn, kiuj koleros eksciante tiun novaĵon.*
Post kiam ni estis trinkintaj la kafon ni daŭrigis la konversacion.	*Trinkinte la kafon, ni daŭrigis la konversacion.*
Kvankam mi estis iomete ofendita mi devis rideti.	*Kvankam estante iomete ofendita mi devis rideti.*
Kiam mi vidis lin tiom malgaja mi provis konsoli lin.	*Vidante lin tiom malgaja mi provis konsoli lin.*
Ĉar li ne estis konsentanta pri la plano, li rifuzis ĝin.	*Ne konsentante pri la plano li rifuzis ĝin.*

Kontraŭe oni ne povas diri por la frazo „Kiam mi eniris la domon, la hundo komencis boji“: „Enirante la domon la hundo ekbojis“, ĉar la gerundio „enirante“ koncernas la subjekton, do ne estis la hundo, kiu eniris la domon, sed la parolanto. (Daŭrigota) *W. Vildebrand*

Ne interŝanĝu!

uzino	Großes Werk der metallverarbeitenden Industrie
fabriko	Fabrik, Werk
laborejo	Werkstatt
administrado, administracio	Verwaltung
diskuto	Diskussion
disputo	Streit
materio	Materie
materialo	Material
proceso	Prozeß (Gericht)
procezo	Prozeß (Entwicklung)
procedo	Handlungsweise, Prozeß
koncepto	Idee, Ansicht, Auffassung
koncepcio	Konzeption
destini	vorherbestimmen, festlegen, voraussagen
determini	genau bestimmen
difini	erklären (Bedeutung, Kennzeichen) bestimmen
specifi	im einzelnen festlegen, bestimmen
sprita	geistreich, witzig
spirita	geistig, nicht materiell
intelekta	geistig, denkfähig, vernunftbegabt
kontribui	beitragen, mithelfen
atribui	zuteilen, beimessen
intereso	Interesse
interezo	Zins
rento	Rente aus Kapitalbesitz
pensio	Alters- oder Krankenrente
reala	wirklich
realista	realistisch
scio	Wissen

El la laboro de la Terminara Komisiono

La 10-an de julio la terminara komisiono kunsidis en Berlino por studi la eblajn tradukojn de certaj terminoj kiuj lastatempe aperis en la germana lingvo precipe en ekonomia kaj politika rilato kaj kies traduko en Esperanto estigis dubon. La komisiono havis sub okuloj 18 demandarojn de kunlaborantoj el la tuta Respubliko kaj profunde kaj serioze diskutis la diversajn aspektojn de la tradukitaj terminoj, kaj proponis fine — mi diras **proponis** — la jenajn:

Aufweichungspolitik	*politiko de ideologia moligo*
Unterwanderung	*kaŝa enpenetro, enfiltrado*
Zersetzung	*demoralizo, subfoso*
Zahlenwert	*nombra valoro*
Kooperationskette	*koopera ĉeno*
Netzplanung	*reta plansistemo*
Kostenaufwand	*kostoj*
Ökonomischer Hebel	*ekonomia stimulo*
Leitungstätigkeit	*gvidado, gvidmaniero*
Engpaß (Waren)	*malabundo*
Materialdecke (ök.)	*materialprovizo*
Erzeugnisgruppe	*kolektivo de fabrikoj de sambrançaj produktoj*
Leitbetrieb	*fabriko kun gvida aŭtoritateco en industria branĉo*
Qualitätspalette	*diverskvalita sortimento*
Entwicklungsland	*evoluanta lando*
Kennziffer	*kriteria cifero*
Eckziffer	*direktiva nombro*
erzeugnisbezogen	*rilate la produkton*
strukturbestimmend	*karakteriza (aŭ decida) por la strukturo*
betriebstypisch	*tipa por la fabriko*

Dum la studado de la senditaj proponoj evidentiĝis ke ne ĉiam regis klareco pri la signifo de la terminoj, kiuj tamen abundas en la germana lingvo ĉu parole ĉu skribe. Certe, kelkaj nocioj estas fremdaj al nefakuloj, aliaj servas por esprimi duoblan sencon. Ofte necesas traduki unu vorton per pluraj por ke ĝi estu komprenebla. Iuj estas simplaj kaj lasas sin interpreti per esperanta vorto, aliaj estigas malfacilon preskaŭ nevenkeblan.

Sed jen, stranga fenomeno: certaj el niaj amikoj kvazaŭ perfortis la lingvon alglutinante al radiko, pro troa zorgo de precizeco, ĉiujn eblajn afiksojn. Temis ankaŭ iomgrade konservi la bildecon de la esprimo.

Plue la komisiono traktis la demandon ĉu necesas citi tutan frazon por ebligi ĝustan kaj korektan tradukon. Ĝi adoptis la sugeston ne publikigi tutan frazon sed almenaŭ specifon. Ĝi konstatis ankaŭ, ke traduko necesigas kelkafoje uzon de pluraj vokabloj. Fine ĝi apelacias la esperantistojn sendi proponojn aŭ fari sugestojn en tiu temo. *W. Vildebrand*

En la Altaj – montoj

De la 15-a ĝis la 26-a de julio okazis apud la belega monta lago Teleckoje en la Altaj-montaro Somera Tendaro de junaj sovetaj esperantistoj. Tien venis 88 gejunuloj el 24 lokoj: 40 el la azia parto de la lando kaj 48 – el la eŭropa. Ĉeestis baŝkiroj, belorusoj, estonoj, judoj, latvoj, litovoj, rusoj, tataroj, udmurtoj, ukrainoj, uzbekoj – reprezentantoj de 20 profesioj. La meza aĝo de la tendaranoj estis 23,9 jaroj. Multaj interesaĵoj konsistigis la programon. Jen kelkaj el la plej sukcesaj aranĝoj: Somera universitato, seminario de aktivuloj, festo de Neptuno, konkurso de arta recitado, ŝipekskursoj sur la belega lago.

(el „Paco" n-ro 178/179, soveta eldono)

Informo

La 23-an de aŭgusto 1969 kunsidis en Berlin la Junulara Komisiono de CLR. Tiu ĉi kunveno kaj ties decidoj estos gravaj por nia laboro. Pri tio kaj pri la Distrikta Junulara Esperanto-Renkontiĝo apud Karl-Marx-Stadt ni raportos en la sekva numero.

Ekzemple . . .

La jara kunveno havis solenan karakteron – ja pasis la unua jaro, dekiam oni fondis la societon. Ĉeestis pli ol 180 esperantistoj . . . Raporton pri la unujara agado tralegis la lernantino Rosica Pavlova, prezidantino de „Verda Raketo". Jen kelkaj faktoj: 150 regulaj membroj, 110 abonantoj al „Bulgara Esperantisto", 2 sukcesaj E-ekspozicioj, 3 E-programoj po 25 minutoj pere de la urba radioreto, multaj materialoj aperigitaj en la loka ĵurnalo „Otečestven Zov", aktiva korespondado kun esperantistoj el pli ol 50 landoj el 5 kontinentoj, kvin tutaj klasoj kaj 1 ĝenerala grupo lernas fakultative Esperanton.

Ĉeestis la kunvenon la prezidanto de la Distrikta Komitato de la Patrolanda Fronto, la direktoro de la urba gimnazio k. a. . .

(el „Bulgara Esperantisto" n-ro 5/1969, Vraca)

La Kri'

(Laŭ la angla melodio „my bonny")

Sur montoj kaj step' indianoj
Ĉasadas kun ruĝfamili',
Kaj se vi postulas parolon,
Kanjono respondas per kri':
Refreno:
Esperanto estas la lingvo por ni, por ni,
Esperanto estas la lingvo por ni.

Tra tuta ĉi vasta terglobo,
En urboj de ĉiu naci'
Troviĝas la esperantanoj,
Soniĝas la tutsama kri':
Refreno:

En densa afrika ĝangalo,
Sovaĝaj nigruloj sen di'
Jam solvis la lingvan problemon,
Per „tam – tam" disiĝas la kri':
Refreno:

Indianoj, eskimoj, nigruloj,
Urbanoj kaj buboj kaj mi
Jam uzas la lingvon facilan,
Do vivu. prosperu la kri!:
Refreno:

(Verkisto nekonata)

A. Pettyn, Varsovio

Antaŭ ol komenci la kurson

Jen ni komencas novan paĝon en nia organo, kiu enhavos kontribuojn pri pedagogiaj kaj metodikaj problemoj de la instruado de Esperanto. Ni hodiaŭ komencas represi artikolon de Andrzej Pettyn, aperintan en „Pola Esperantisto" 2/67. A. Pettyn estas eminenta specialisto pri Esperanto-instruado, verkinto de pluraj polaj Esperanto-lernolibroj, redaktoro ĉe Radio Varsovio.

Planado de la instrumaterialo

Alta nivelo de preskaŭ ĉiu Esperanto-kurso grandparte dependas de ĝusta aranĝo kaj antaŭpreparo de la instruado fare de kursgvidanto. Ĉiu kursgvidanto devas konscii pri la neceso plani sian laboron. La planado konsistas en la determino de celoj, al kiuj oni strebos, en la divido de la instruado je unuopaj etapoj kaj pripenso de rimedoj kaj metodikaj artifikoj utiligendaj por atingi la fiksitan celon.

En nia plano ni ne povas preterlasi la partoprenon de la kursanoj en la esperantista vivo de la klubo aŭ societo, la partoprenon en diversaj esperantistaj solenaĵoj kaj kampanjoj, kio pli firme ligas la kursanojn al la movado.

Ĝuste uzi la lernolibron

Ĉar la plimulto de la kursgvidantoj bazas sian instruadon sur lernolibro, estas rekomendinde, ke oni konatiĝu kun ĉiuj lernolibroj disponeblaj en la lando, kaj — se tio estas ebla — kun kelkaj pli bonaj lernolibroj diverslandaj. Ĉiu E-instruisto rajtas kaj devas elekti tiun lernolibron, kiu — laŭ la vidpunkto de la aplikita metodo — plene taŭgas por la koncerna kurso. Decidante pri la elekto de tiu aŭ tiu lernolibro oni devas konsideri la aĝon kaj sekson de la lernontoj, ilian edukitecon kaj konon de fremdaj lingvoj, la profesian medion, el kiu ili devenas, la nombron da instruunuoj destinitaj por la tuta kurso, la oftecon (en semajno) kaj longecon de la instruunuoj ktp. Nur post pripenso de ĉiuj menciitaj faktoroj oni elektas lernolibron. Inter la esperantistoj troviĝas kursgvidantoj, kiuj neglektas lernolibron, subtaksas ĝian valoron, tre ofte instruante entute sen lernolibro. Laŭ mia opinio ili faras gravan eraron, ĉar la lernolibro plenumas utilan servan rolon.

Ĝi ne nur disponigas diversspecajn dialogojn, konversaciajn tekstojn, skribajn aŭtomatigajn ekzercojn, sed ankaŭ rememorigas, ordigas kaj firmigas la scion akiritan dum leciono. La lernolibro tre ofte servas ankaŭ por memstara lernado, kiam la lernanto ne povas ĉeesti la lecionon. Kompreneble ĉio ĉi ne signifas, ke la kursgvidanto estu sklavo de sia lernolibro kaj instruu frazon post frazo fidele laŭ la sinsekvo de la lernolibra materialo. Ne! Tiel instrui oni ne nur ne povas, sed eĉ ne rajtas! Se oni tiel instruos en la kurso, iu povos ekhavi la suspekton, ke la instruisto konas la lingvon je la proverbaj tri lecionoj pli ol la kursanoj. La kursgvidanto estu invitema kaj laŭbezone, jen tiel jen tiel, enkon-

Sistemaj esploroj pri laborista Esperanto-movado

Karl-Marx-Stadt. La esplorgrupo pri la historio de la laborista esperanto-movado de la Distrikta Laborrondo Esperanto de Karl-Marx-Stadt jam prezentis unuan reszulton de ĝia diligenta laboro. Sub la gvido de *Willy Weißbach* ĝi ellaboris pli ol 40-paĝan manuskripton pri la historio de la iama LEA-distrikto Erzgebirge/Vogtland.

Membroj de la distrikta komisiono por la esploro de la historio laboristmovada kaj historiistoj de la Teknika Altlernejo de Karl-Marx-Stadt trovis la materialon tre interesa kaj inda por plia prilaboro kaj posta publikigo. Ili nun subtenos la pluajn esplorojn kaj donas helpon ĉe la pretigo de la materialo por publikigo.

Ni gratulas niajn amikojn en Karl-Marx-Stadt al la ĝis nun atingitaj bonegaj rezultoj kaj ĝojus, se aliaj distriktoj finfine ankaŭ komencus sekvi la ekzemplojn de Rostock kaj Karl-Marx-Stadt. *CLR*

Radio Varsovio pri ni

Radio Varsovio kelkfoje informis pri la GDR-libro en Esperanto. La pola radio-stacio same disaŭdigis la salutparoladon de *R. Graetz* dum la inaŭguro de la 54-a Universala Kongreso.

Vespero de germana-pola amikeco

Sub la devizo: „20 jaroj GDR-25 jaroj Pola Popola Respubliko“ la Esperanto-grupo „Popolamikeco“ Werdau kaj ties adopta grupo „La ponto“ en Ronneburg aranĝis vesperon de germana pola amikeco. Gasto estis la juna pola esperantisto *Stanislaw Rynduch*, kiu tiom perfekte parolas Esperanton kiel li scipovas kanti polajn kaj esperantajn kantojn. Kvizo, prezento de interesaj koloraj diapozitivoj kaj artistaj konkursoj garantiis interesan kaj impresoriĉan vesperon. Super ĉio staris la nevidebla postulo, esprimitaj en la salutvortoj: *„Ĉiam regu la amikeco inter la germana kaj pola popoloj! Neniam denove dezertigu milito niajn landojn!“* Kurt Heeg

GDR-gazetaro pri la UK en Helsinki

Pri la sukcesa reprezentiĝo de la GDR-delegitaro dum la 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki raportis laŭ ADN-komunikaĵo multaj taggazetoj kaj semajnaj ĵurnaloj de GDR. Inter ili „Neues Deutschland“, „Sächsische Zeitung“, „Ostseezeitung“, ĉiuj la 5-an de aŭgusto. Krome raportis „Norddeutsche Neueste Nachrichten“ (8. 8. 69), „Der Sonntag“ (17. 7. 69), „Der Morgen“ kaj aliaj gazetoj.

---

duku novan materialon, sed ne sekvu blinde la lernolibron! Multaj instruistoj-por montri al la lernantoj sian altan lingvokonon- emas senĉese dikti, anstataŭi la lernolibron per notaĵoj aŭ diktaĵoj. La diktaĵoj povas kompletigi la lernolibron, sed ne anstataŭi. Eĉ ne sufiĉa bona lernolibro estas pli utila ol diktitaj notaĵoj, kiuj ja ĉiam forprenas multan tempon, kelkiam kaŭzas miskomprenojn kaj eĉ erarojn kaj povas influi malkorektan alproprigon de iu gramatikaĵo. Resume: Kompletigu la lernolibron nur laŭbezone kaj laŭnecese.

(Daŭrigota)

INTERNACIA LINGVO KAJ FILATELO

Esperanto-poŝtstampoj

Japanio

1936	Sapporo	24a japana Esperanto-kongreso
1952	Kioto	39a japana Esperanto-kongreso
1953	Okayama	40a japana Esperanto-kongreso
1954	Tokio	41a japana Esperanto-kongreso
1955	Osaka	42a japana Esperanto-kongreso
1956	Tokio	43a japana Esperanto-kongreso
1957	Nagoya	44a japana Esperanto-kongreso
1958	Fukuoka	45a japana Esperanto-kongreso
1959	Tokio	46a japana Esperanto-kongreso
1961	Toyama	48a japana Esperanto-kongreso
1963	Osaka	50a japana Esperanto-kongreso
1965	Tokio	50a Universala de Esperanto Kongreso
1965	Ootu	21a TEJO-kongreso
1966	Nagoya	53a japana Esperanto-kongreso
1968	Sapporo	55a japana Esperanto-kongreso

Italio

1935	Roma	27-a Universala Kongreso de Esperanto (ronda)
1935	Roma	27-a Universala Kongreso de Esperanto (ortang.)
1948	Vicenza	3a regiona kunveno
1950	Roma	22a IKUE-kongreso
1951	Pisa	23a nacia Esperanto-kongreso
1952	Bologna	24a nacia Esperanto-kongreso
1953	Lucca	Regiona Esperanto-kunveno
1954	Verona	6a IFEF kongreso
1955	Bologna	40-a Universala Kongreso de Esperanto
1956	Massa	27a nacia Esperanto-kongreso
1957	Palermo	2a regiona kunveno
1957	Varese	28a nacia Esperanto-kongreso
1958	Palermo	29a nacia Esperanto-kongreso
1959	Firenze	30a nacia Esperanto-kongreso
1960	Cortina	31a nacia Esperanto-kongreso
1961	San Remo	32a nacia Esperanto-kongreso
1968	Montecatini	39a nacia Esperanto-kongreso

La filatelista Asocio de GDR en Germana Kulturligo aranĝas la 31-an de oktobro ĝis la 9-a de novembro en Magdeburg Nacian Ekspozicion de Poŝtmarkoj. Pluajn informojn ĉe Philatelistenverband der DDR 108 Berlin, Charlottenstraße 60.

KRUCENIGMO



Horizontale: 1. skrib-fluaĵo, 3. demanda pronomo, 5. sento, 7. rifuĝejo, 8. sento de monotoneco, 10. sufikso (daŭro), 11. tegmenta fenestro (R), 12. produkto de besto, 13. minaĵo, 16. konjunkcio, 17. relegia pentraĵo, 19. nombro, 20. parto de la korpo (R), 21. sidmeblo.

Vertikale: 1. „ilo" por pensi, 2. restad-loko en dezerto, 3. parto de korpo, 4. muzika instrumento, 6. persona pronomo, 7. vendi laŭ plej multa propono (R), 9. alia esprimo por sole, 10. parenco, 14. organo sensa (R), 15. malantaŭa parto de la ventro (R), 18. sufikso (parto).

Noto: La tria litero de 8. (horiz.) estas u, la dua litero de 7. (vert.) estas ŭ. R = nur la radiko.

Azraela Wagner

Solvo de la kruc-enigmo el n-ro 32/33

Vertikale: 1. hibisk, 2. tribut, 3. alia, 4. obei, 5. kuri. 6. pafo, 7. telero, 8. liriko, 13. mark, 14. niks, 16. tabakon, 17. pelikan, 18. atolojn, 19. alkohol, 21. dezir, 22. oazo, 23. star, 24. atomo, 29. loka, 30. gasa, 31. aliu, 32. homaro, 33. rigida, 35. turnir, 36. jardoj. 39. koro, 40. koni, 41. torn, 42. arom.

Horizontale: 1. hetmano, 5. kapital, 9. bru, 10. bridi, 11. filtr, 12. amikino, 15. stup, 18. arak, 20. katedro, 23. skatolo, 25. lekanteto, 26. valiz, 27. oleon, 28. kilogramo, 32. horaro, 34. lojtoj, 37. onin, 38. nula, 39. kakatuo, 43. amiko, 44. ranid, 45. nur, 46. oratori, 47. nombroj.

INFORMOJ

Vor dem 20. Jahrestag der DDR

Der französische Freund William Gilbert, Chefredakteur von „PACO", der am 5. Juli vor den Leipziger Esperantisten über die Aufgaben der Esperantisten im Kampf für Frieden und europäische Sicherheit sprach, schrieb uns u. a.:

„Wir (seine Frau und er) erinnern uns dankbar an die vielen angenehmen Erlebnisse während unseres Aufenthaltes in Leipzig. Die DDR, d. h. Euer Volk, hat gewaltige Leistungen vollbracht. Die Errungenschaften Eures Staates, unter der Führung der Partei der Arbeiterklasse, helfen uns im Kampf gegen imperialistische Intrigen. Entlarvt weiterhin durch Eure revolutionären Taten die imperialistischen Lügen von einer Nichtexistenz der DDR. Eure ökonomischen Erfolge, das Ergebnis Eurer guten ideologischen Arbeit, werden zunehmend in der Welt erkannt und anerkannt."

(Aus „Informationsblatt" 4/1969 der Leipziger Arbeitsgruppe Esperanto)

Esperanto en soveta televido

La 10-an de majo 1969 la ukraina televido elsendis 15-minutan programon kun 4 studentoj pri Esperanto.

RECENZO

„BULGARIO — mallonga skizo" de Spas Rusinov. Agentejo Sofia-Press, 1968. Broŝurita. Formato 65/92/32. Eldonkvanto 3100.

Libreto, kiu inde viciĝas en aro da informaj eldonaĵoj pri diversaj landoj. Tre koncize ĝi donas klarigojn pri ĉiuj sciindaĵoj. Ŝajne nenio — eĉ malgravaĵoj ne — estas forgesita. Ankaŭ konanto de la lando trovas multan novan. La historiaj ĉapitroj speciale legindas. Por kompreni la unikajn sociajn progresojn de Bulgario, necesas koni la mizeran kaj kruelan sorton de la bulgara ŝtato en la lastaj jarcentoj. La nuntempo reliefiĝas per imponaj faktoj ekonomiaj, kulturaj kaj politikaj. La avantaĝoj de la socialismo prezentiĝas klare.

La aŭtoro tre lerte kompilis la materialojn. Multaj ilustraĵoj, geografiaj kartoj, diagramoj kaj tabeloj faciligas la legadon. La nomo de Asen Grigorov, kiu redaktis la esperantlingvan eldonon, garantias lingvan kvaliton. Preseraroj apenaŭ rimarkeblas. La libreto estas inda kontribuo okaze de la 25-a jubileo de la liberigo de Bulgario. Ĉiu esperantisto devus ĝin posedi por pli intime konatiĝi kun la amika socialisma lando, kie agas la plej forta Esperanto-Asocio.

La 1-an de aŭgusto mortis post grava malsano la fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, Kortega Konsilisto

HUGO STEINER

en sia 92-a jaro Li estis honora prezidanto aŭ honora membro de multaj internaciaj esperanto-organizoj.

Centra Laborrondo
Esperanto de GDR

Herausgeber: Deutscher Kulturbund (Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Eugen Menger.
Redaktionskommission: Otto Bäßler, Detlev Blanke, Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Willi Vildebrand.
Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DRR. Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf. - Druck: Druckwerkstätte Glauchau Julius Pickenhahn KG III-12-8 872

INFORMOJ

Helpe al Vjetnamio esperanto-loterio

La 27-an de majo la Moskva Internacia Esperanto-Klubo aranĝis specialan vesperon dediĉitan al la helpo por Vjetnamio. Post la raporto de N. D. Sulje oni aranĝis loterion, dum kiu estis lotumitaj pli ol 300 esperantaĵoj La tuta profito de tiu loterio estas oferita kiel helpo por la batalanta Vjetnamio.

(Laŭ informoj de T. Kulagin)

Materialo pri Lenin serĉata

Sekvontjare la tutmonda laboristaro festos la 100-jaran jubileon de la naskiĝtago de *Vladimir Iljiĉ Lenin*. La Jalta Esperanto-Klubo „Mevo" organizas okaze de tiu evento grandan ekspozicion „Lenin eksterlande".

La esperantistoj de la tuta mondo estas petataj sendi bildkartojn aŭ ilustraĵojn el revuoj, turismajn prospektojn kaj similajn materialojn pri urboj, kie Lenin iam efikis. Same estas akceptataj kun danko libroj, broŝuroj kaj gazetartikoloj pri Lenin en diversaj lingvoj, aŭ poŝtmarkoj, fotoj pri Lenin-monumentoj, lernejoj kun lia nomo ktp. La materialo estu sendota al *Mikaelo Cimberov, Jalta, ul. Kirova 10—1, Sovetunio.*

Korekto en la libro pri GDR

Sur paĝo 197 la diagramo devas ĝuste teksti:

Kvotoj pagendaj de la membro	de la sindikato
50,—	75,—
38,—	57,—
62,50	62,50
47,50	47,50
75,—	50,—
57,—	38,—
87,50	37,50
66,50	28,50
100,—	25,—
76,—	19,—

200-a Esperanto-leciono en „Der Morgen"

La 10-an de aŭgusto 1969 aperis en la taggazeto de la Liberala Demokrata Partio de Germanio (GDR) la 200-a leciono de la varia Esperanto-kurseto, komencita de Paul Lindner kaj nun daŭrigata de Peter Levsen. La kurso disponigis kaj plue disponigos kaj al progresintaj kaj al komencantaj esperantistoj taŭgan materialon por lingve pliperfektiĝi. Ĉiutagaj dialogoj, aplikeblaj en la kursoj paroligante la kursanojn, tipaj konversacioj pri diversaj temoj, gramatikaj klarigoj, ŝercoj, informoj kaj aliaj materialoj aperas en la dimanĉa eldono de la gazeto ĉiun duan semajnon.

Sonbenda servo

La Centra Laborrondo Esperanto de GDR ankoraŭ disponas pri sonbendoj kun jena enhavo: Prof. dr-ro *Bokarev*, Moskvo: „La internacia lingva situacio kaj eblecoj de raciigo" kun simultana traduko de D. Blanke, 45 minutoj.

Prof. dr-o *Viktor Falkenhahn*, Berlin: „Lingvistikaj konsideroj pri la rolo kaj strukturo de Esperanto" (en germana lingvo, 90 minutoj). Dr-ro *Jaky*, Budapest: „Esperanto kiel perilo de la monda literaturo" (Esperanto, 30 minutoj). *Rudi Graetz*, prezidanto de CLR, Berlin: „La kontribuo de la esperantistoj por la konservigo de la paco" (Esperanto, 60 minutoj). *Detlev Blanke*, Berlin: „Historia skizo de la laborista Esperanto-movado" (Esperanto, 75 minutoj). La sonbendoj estas 9,5 rapidaj kaj lueblaj aŭ aĉeteblaj je moderaj prezoj. Informojn ĉe Centra Laborrondo.

KORESPONDDEZIROJ

GDR

Kiu skribe ludos ŝakon kun mi? Mi serĉas ŝakludantojn en ĉiuj eŭropaj landoj-ankaŭ ŝakludantojn esperantistajn el GDR por ŝakludi koresponde. Karl Bosenius, DDR **1613 Wildau,** Kirchstr. 4

Hungario

18 membra Naturscienca Junulara Ekspedicio „PANNONIA“ serĉas sciencan amikan kontakton kun samfakaj ekspedicioj — institutoj lernejoj kaj pedagolernejoj. La ekspedicio posedas pli ol 10 000 ekzemplerojn da papilioj — insektoj — libeloj — skaraboj por la interŝanĝado el la tuta hungarlanda faŭno. Bonvolu sendi al ni pakaĵojn de via faŭno kaj ni poste tuj sendos niajn laŭ via deziro. Sendu ĉion al entomologo Georgo Juhász, **Budapest IV,** Ujpeŝt. Kálvin János utca 37, 1/L, Margyarország. Eŭropo.

Magnetofona studio „Budapeŝt“ deziras korespondi kun esperantistoj el GDR. Skribu al László B. Toth, teknika-gvidanto de la studio. **Budapeŝt IX.** Vaskapz útca 1/B.

Amatorfoto studio „Orion Televido“ organizas internacian fotokonkurson. La temo estas la somero. Oni povas partopreni kun 10 pecoj de fotoj 18 x 24 cm. Limdato estas 1-a de aŭgusto. Skribu al Ervin Fördös, studio-estro, **Budapeŝt** P. oficejo 5, poŝtfako 141.

Socialista Brigado „Luna 68“ de Mikro 43 mühély ORION, gvidantino: Valéria BELLONI kun 18 membr. **Budapeŝt X,** Jászberényi ut. 29.

Socialista Brigado „VÖRÖSMARTY“ (Vörösmarry) Orion 42 mühely. Gvidantino Eva PAPP kun 9 gemembroj, **Budapeŝt C.** X. Jászberényi út. 29.

Junkomunista Komitato KISZ Bizottség. Orion, **Budapeŝt 5,** poŝtfako 84.

Maroko

Marokano, 28 jara, kiu vizitos dum decembro 1969 GDR deziras korespondi kun esperantistoj el GDR pri muziko, arto, geografio, historio, literaturo. sporto, dez. interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn tutmonde. Bayod Hoceine. 35 35 Face Nouvelle Mosqueé, **Tabriquet-SALE,** Marocco.

Pollando

Studento, 21 jara deziras korespondi tutmonde. Dudon Ryszard **Krakow 43,** ul. Gramatyka 10.

Lernantino, 17 jara deziras korespondi pole, ruse, france, germane kaj esperante pri geografio, historio, junularaj problemoj, ĉiutaga vivo, sporto, turismo kaj precipe pri fremdaj lingvoj. Kolektas pm kaj bk. Matgorzata Dudziak, **Wolsztyn,** ul. Marchlewskiego 9. woj. Poznanskia.

Fraŭlo, 23 jara deziras korespondi kaj interŝanĝi pm kaj bk. Tadeusz Adamczyk, **Tomaszow Maz.,** str. Niska 24 m 15 N

Instruisto, 24 jara interesiĝas pri muziko, literaturo, filmarto, fotoarto, fremdaj lingvoj, ĉiutaga vivo, pedagogio, turismo, kolektas bk diskojn kun serioza muziko. Stefan Kamocki, **Darlowo,** ul. Obroncow stalingradu 78.

Soveta Unio

Lernantino, 15 jara, deziras korespondi kun la tuta mondo pri sporto, E-eldonaĵoj. kolektas bildkartojn kaj bildojn de filmaktoroj, Valentina Pustovalova, ul. B. Komissarov 61, **Doneck-87,** Ukrainio.

Viktor Nikolajewiĉ Širekin, 18 jara, deziras korespondi. **Barnaul,** Do vostrebovanija.

Aleksis Tiodorovas, 15 jara, deziras korespondi, **Klaipeda 8,** str. Tarybinestomijos 52-2, Litovio.

Limas Rupkus, 17 jara, deziras korespondi, **Klaipeda,** Smilties pylimo 14, Litovio.

Junulo serĉas korespondamikojn el GDR Nikolao Lizica, **Baĵanovo,** ul. Kriwoj Rog 31, str. industrialnaja 1. Ukrainio.

Kun 17-jarulinoj el GDR, Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj. Pollando deziras korespondi:

1. Olenec Vladimir, **Zaporojje-34,** Bilkina 8, kv. 2, 18-jara, dez. interŝanĝi bk kaj garomofondiskojn.
2. Iljev Jurij kaj Iljev Valentin-studentoj de elektroteknika teknikumo. Bilkina 14, kv. 33 **Zaporojje-34.** Ukrainio.

Junulo deziras korespondi pri diversaj temoj, kolektas poŝtmarkojn. Juozas Janauskas, **Tešiai,** Komjaunimo 17, Litovio

Pri problemoj dela paco kaj la estonteco deziras korespondi Vasilkovskij Vjaĉeslav, **Kiev-1,** do vostrebovanija.

Kun esperantistoj el diversaj landoj pri ĉiuj temoj, s-ino Vdovica **Peter,** Popasnaja 4. LUGANSK, obl. Parhomenko, USSR.

27-jara inĝenierino-fizikistino, pri sciencaj temoj — Valentina **Merejnikova,** CELABINSK 18, str. Slovjanskaja 7—5, USSR.